





MESYEI KÖNYVTÁR
OLVASÓTEREM
392 GÖTARJÁN

89/6. 16,-Ft

HUNGARA

VIVO



Reakcia ideologio en formo polurita ĝis perfekte

István Nemere: Vi povas morti nur dufoje. Romano, daŭrigo de „Vivi estas danĝere. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝt, 1989. 21 cm, 183 p. Prezo: 21,- ned. gld. (Por Hungario: 90,- forintoj.)

„Vi povas morti nur dufoje”, daŭrigo de „Vivi estas danĝere”, estas la dekunua romano de István Nemere, kiu per ĝi fariĝas la plej produktinta Esperanto-romanisto, laŭvolumo kaj laŭ paĝonombro. Pri tio oni legu en recenzo de Osmo Buller pri „Vivi estas danĝere” (Hungara Vivo, 6a numero 1988). Sekvalinie mi nur verkas kurtan daŭrigon de la recenzo de Buller, kies asertojn oni povas facile apliki vorton post vorto al tiu ĉi romano.

Unu vorto konstante ripetigas ĉi-verke, malkiel en „Sur kampo granita” kaj multe pli eksplicite ol en „Vivi estas...”: venĝo. Venĝo ekster aŭ preter koruptaj leĝoj de koruptaj ŝtatoj, cetere okcidenteŭropaj. Se por Clever eblintus proceso kaj ekstradicio, por Caudry, male, nur morto kaj eventuale iom da torturo konvenas.

Iel ŝajnas do, ke Nemere elektis simplan solvon: okulon pro okulo, denton pro dento. Kiel kompreni tion? Humanismon mi nenie vidas. La aŭtoro, en sia, se tiel nomi ĝin, publika letero „Inter la ungoj de la negativa fenikso” (Hungara Vivo, 3a numero 1989), kvazaŭ ŝetas ioman lumon sur mian demandon: „Kiom granda estas mia respondeco? Kion mi surpaperigas, la vorto povos iĝi ago. La celo de miaj romanoj pri teroristoj estas averto kaj alarmo; mi neniel transpaŝas la praajn regulojn: en tiuj libroj triumfas la bona, kaj malvenkas la malbona (eĉ se nur provizore).”


Tiun maniĥisman mondbildon, ne tiel evidentan en „Vivi estas...”, la ĉefrolulo, Danny Skagen aŭ Daniel Dommel (aŭ la aŭtoro, kiu ne pro nenio elektis rakonti mi-persone) vortigas iel kaj aliel, ekzemple: „kontraŭbatali la malamikon, likvidi lin definitive” (p.6), „sed mi ne rezignos pri la venĝo” (15), „Kiom da miloj povas esti tiuj, kiujn helpas, se nia plano sukcesos?” (61), „Kaj komprenu: la morala pravo estas je mia flanko. Mi batalas kontraŭ tre danĝera malamiko de la socio.” (101). Sed tiel parolas ĉiaj teroristoj, ĉu ne?

Per parenca logiko la mio de l' romano komprenigas, ke ne li estas sikario: „Mi ne estas murdisto. Vi mem vidis, ke nur pro sindefendo mi mortpafis tiujn du.” (99). La malamiko, male, „ordonis mortpafi kelkuijn. Mi opinias, ke li ordonis tion multfoje, ke li kredis tion natura afero, eble eĉ kondiĉo de sia laboro, sia rango. Li estis ministro pri internaj aferoj, (...) povis mem konsideri la limojn de leĝeco, laŭ sia volo kaj intereso.” (111).

Por Nemere iel ŝajnas klare, ke venĝi estas necese, neeviteble, home, kaj ke oni rajtas mortigi „por justa celo”, punante — eksterleĝe, per armiloj — kovardan murdiston, krimulon.

Tre probable ne indas konsideri tiajn erojn kaj onojn, kiam oni legas aventuran romanon, kiu celas pleje distri. Romano, tra kies 183 paĝoj, kiel en filmo pri Indiana Jones, peripeitias homoj, aŭtoj kaj armiloj, murdoj, politiko, sikarioj kaj sbiroj, policanoj, teroristoj kaj ĉiaspecaj viktimoj. Kaj ĉio okazas pli krude kaj realisme, ol en „La blinda birdo” aŭ „Serĉu mian songon”, samtempe pli fleke kaj leĝere, ĉar roluloj kaj okazoj tiel lerte plektiĝas, ke leganto ne povas stumbli nek eĉ halti. La stilon, teknikojn de la antaŭaj romanoj, ekde „La fermita urbo” en 1982, li nun poluris ĝis perfekte. Malgraŭ tio, nepras atenti la prafonon (ne la plafonon!), la etoson de la romano. Tiel rimarkeblas subkuŝanta, ambigue reakcia

RECENZOJ



ideologio, per kiu kutime plebistoj pravigas, ekzemple, mortopunon. Kaj tio novas ĉe Nemere.

En artikolo pri Hamleto (Monda Kulturo, 13a numero, aŭtuno 1965) William Auld skribis: „En tiu situacio, lia sola rimedo estas la venĝo, sed li konscias tro akre kaj tro klare, ke venĝo nenion rekonstruos. Pli simpla aŭ pli primitiva animo estus venĝinta malgraŭ ĉio; sed Hamleto estas samtempe tro sentema kaj tro inteligenta por kontentiĝi tiamaniere. Li konscias la senutilecon de la venĝo. Tio signifas, ke li konscias la senutilecon de la punmotivo. Al Hamleto necesas agado, kiu nuligus la pasintecon, kaj tia agado ne estis ebla. Nek venĝo nek puno (ili estas la sama afero) iam ajn povas nuligi la krimon.” Por Nemere do ne ĉiu homo estas princo aŭ reĝido de Danujo.

Eble la fino de la romano impresas malpli forte, ol tiu de „Vivi estas...”, tamen ĉiu paĝo, ĉiu sekundo en la fabulo plenas je aktivo, vigo, energio, je vivo. La aŭtoro ne hazardis eĉ unu pecon de sia puzzle. Ankaŭ la stilon mi admiras, tiel naturan. Tamen ĝenis min lingvajaj detaloj: vortoj aperas misortografie aŭ, almenaŭ, malkiel en PIV-S: anstataŭ eraraj „plastika, spagetoj, makaronoj, frizuro, Korsiko/Korziko, baloto, muskulo, celoj” kaj aliaj, devas legiĝi „plastia, spagetoj, makaronoj, frizaĵo, Korsikio, balotado, muskolo, ĉeloj”. Tiuj eraroj agace ripetigas, ŝajne Nemere konscie preferas ekzemple „hostaĝo” al „ostaĝo”, por eviti homonimecon kun „ostaĝo”. Kion pensi pri tio? En „Vivi estas...” li skribas „zero” anstataŭ „nulo”. Novajn radiokojn kaj afiksojn prefere oni glosu: „koreografio, afro-, mini-, infraokulvitroj.” Fine mi proponas al li, ke anstataŭ la pezaj kaj misgvidaj „narkotilo(iko)jaĵo” aŭ la misderivita PIV-Sa „toksiko”, li adoptu pli facilan terminon: „narko”. El ĝi pluformeblas: narki sin, narkita, -ulo, -isto, -ilo, -ejo, -ismo, -emio, narkomanio, narkolando, narkopolico, narkodolaroj ktp.

Mi finu. Mia kurta recenzo iĝis tre, tre longa.

Georgo KAMAĈO
(Suomio)

Monumento al la bulgaraj antifaŝistoj

Georgi Karaslavov. Tango. Nove-lo. Sofia 1988. Tradukita de Nikola Uzunov kaj Petar Todorov. Kun antaŭparolo de Veselin Josifov. 93 p.

G. Karaslavov staras en la unua vico de nuntempaj bulgaraj verkistoj. Liaj libroj estas dediĉitaj al la batalo kontraŭ faŝismo kaj milito. Ilin karakterizas vivplenaj figuroj, dramecaj okazoj kaj populara lingvo — kvalitoj troveblaj ankaŭ en „Tango”, verkita en 1948.

La historia fono de la novelo estas la tempo de furioza faŝista teroro en Bulgario. En 1941 la reakcia registaro aliĝis al la akso Berlino-Romo-Tokio. Bulgario subtenis la batalon de la faŝista germana armeo kontraŭ Sovet-Unio liverante krudmaterialojn kaj nutraĵojn al la Hitlera Germanio. La bulgara popolo ege suferis de tiu situacio. Multaj laboristoj kaj kamparanoj sekvis la alvokon de la Patrolanda Fronto kaj iris en la montaron kiel partizanoj aŭ formis sabotadgrupojn en fabrikoj kaj vilaĝoj. Tiu batalo postulis multajn viktimojn. Miloj da antifaŝistoj estis murditaj de la faŝistaj polico kaj justico. Al ili G. Karaslavov faris dignan monumenton per sia verko „Tango”.

La novelo konsistas el tri partoj, kies figuroj ne havas rektajn interrilatojn kaj ne konas sin reciproke. Ili prezentas kontraŭajn opiniojn kaj mondkonceptojn. La tri partoj de la agado kunigas la ekzekuto de tri komunistoj.

La unua parto disvolviĝas dum festo en la sfero de la faŝistigita bulgara burĝaro. La senmaskiganta priskribo de la aŭtoro estas precipe impresa, ĉar li prezentas la personojn, ilian agadon kaj medion ne rekte de sia pozicio, sed laŭ la vidpunkto de unu el al ĉefaj figuroj, de la ĉefprokuroro Jorgov kaj ties amatino. Tiu Katja Ĥavaĝieva malamegas la komunistojn. Ŝi pensas, „ke se oni frakusas kaj ekstermus la komunistojn ĝis la lasta, la homaro renaskiĝus kaj super la mondo ekbrilus nova suno...” kaj en tiu senco ŝi postulas „heroaĵojn” de siaj samklasanoj. Jorgov opinias fari tian mortigante sendefendajn homojn pro ilia batalo por pli bona vivo. Por gajni la amon de sinjorino Ĥavaĝieva li ordonas la ekzekuton de tri komunistoj. La komenca simpatio de la leganto por la ĉefprokuroro rapidege ŝanĝiĝas al abomeno. La aŭtoro majstre montras, kiel — sur la fono de la batalo ĉe Stalingrad — la faŝista burĝaro timas sian pereon kaj pro tio ĝi fariĝas pli kaj pli danĝera.

En la dua parto Karaslavov montras la ordinaran vivon de la bulgara popolo en vilaĝo. Ni konatiĝas kun la parencoj de la tri komunistoj, iliaj zorgoj kaj timoj pro la edzoj, filoj kaj fratoj. Ili nun unura espero konsistas el tio, ke la Soveta Armeo avancas sufiĉe rapide por savi la vivojn de la kondamnitaj. En tiu parto la aŭtoro uzas antaŭ ĉio la dialogon por karakterizi la personojn. Priskribante la atmosferon, de kiu ili devenas, li preparas la leganton por la renkontiĝo kun la tri komunistoj en la mortĉelo.

En la tria parto ni renkontas la tri heroojn mem. Ili estis akuzitaj „pro sabotaĵo kaj konspiraĵoj kontraŭ la reĝimo kaj la sekureco de la ŝtato”, estis kondamnitaj al morto kaj nun ili travivas la lastajn horojn antaŭ la ekzekuto. La aŭtoro montras heroojn, kiuj batalis kaj mortos por justa socio, por la feliĉo kaj prospero de ĉiuj homoj. Ĉe tio Karaslavov lerte eskapas el la danĝero de idealigo. Ivan, Boris kaj Jurdan estas ordinaraj homoj de la popolo, kiuj revas pri siaj infanoj, edzino, geamikoj. Ili timas la morton, sed kiel komunistoj ili montriĝas firmaj kaj heroaj. Ankaŭ la realista priskribo de tiuj lastaj minutoj ilustras la ampleksan scion pri la vivo kaj la artan majstrecon de la aŭtoro.

Estas ĝojinde, ke nun la novelo estas alirebla al pli granda, internacia publiko. La traduko al Esperanto estas tiom ekzakta kiom necesas kaj tiom libera kiom eblas por transigi la karakterizan rakonton de Karaslavov inkluzive la stilajn nuancojn ĉe la lingvouzo de diversaj klasanoj. En salutinda dua eldono estu eliminataj la kelknombraj preseraroj (precipe p.64!) kaj la miskompreniga traduko (aŭ eble ankaŭ preseraro?) sur p.27; krome la glosaro estu kompletigita. Sed tiuj malgataĵoj ne ŝancelas la ĝeneralan impreson, ke „Tango” de G. Karaslavov estas valora elemento de ĉiu Esperanto-biblioteko.

Sabine Fiedler

Post-terura literaturo

Postmilita Japana Antologio. Kompilis: ODAGIRI Hideo, MIYAMOTO Masao kaj KONISI Gaku. Eldonis: Japana Esperanta Librokooperativo, Osako, 1988. 14 cm, 319 p.

Japanio trairis, precipe dum la lasta jarcento, vidindajn ŝanĝiĝojn. Ankaŭ sur literaturo kampo, kie la malnovaj formoj kaj ĝenroj donis iom post iom lokon al la modernaj, ne elpuŝante tamen tute la tradicion. Tian duecon bone respegulus tuteca Japana Antologio. Kio tamen ne instigas la japanojn al tio? Ĉu timo al torseco de la prezento, prefero al formikumado sur diversaj kampoj aŭ specifaj postuloj de la legantoj? Estu iel ajn, ni ne tro perdas, se konsideri, ke ĵen „Postmilita Japana Antologio” enĉeniĝas en kaj kompletigas belan vicon de novelaroj, konsistantan el „Japanaj Rakontoj” (1910), „El Japana Literaturo 1868-1945” (1965), „La Kapao (kaj aliaj rakontoj)” de Akutagawa (1954), „Rakontoj de Oogai (1962), „Japanaj Malnovaj Rakontoj” (1965) kaj „Kvin Virinoj de Amoro” de IHARA Saikaku (1966).

Kiel la titolo de ĉi tiu novelkolekto antaŭsignas, interne de ĝi streĉiĝas ĉefe premaj kaj ekscitaj temoj de la dua mondmilito, precipe terura por japanoj ne nur pro la enormaj perdoj, sed ankaŭ pro la repaciĝo kaj restarigo de la deekvilibriginta homa kaj nacia dignosento.

La „flagopeco” de la kolekto — „Floroj de Somero” de HARA Tamiki — frape donas la ektonon. La aŭtoro, mem atombombito, kondukas nin tra la ĵus detruita Hiroŝimo, kvazaŭ direktante objektivan objektivan de kamerao ĵen al, ĵen ĉirkaŭ si. La efekto estas mutiga: senvoĉaj kadroj ruliĝas pri konsternigaj scenoj. Protesto ne povas esti pli „laŭta”.

Ankaŭ aliajn pecojn de la kolekto superregas la „granda temo” de la postterura literaturo, la milito. Ĵen kelkaj frapvortoj: dilemo de mortigo kaj mortiĝo, dilemo de la samtempa fideleco al la patrujo kaj humanismo, alfrontiĝo al la propra kaj aliala morto, krimo kaj sinjuĝo, punado kaj puniĝo ktp.

Tra la okuloj de prosuferanta soldato vidigas la militon OOKA Syohei en la novelo „Ĝis Mi Estis Kaptita”. La protagonisto de la mi-rakonto, servanta en iu insulo de Filipino, sieĝata de usonanoj travivas la peripetiojn de malvenkanta, viktimiĝanta soldato, alfrontiĝas al la propra morto kaj mortigo de la „deklarita” malamiko, juna usona soldato, al kiu li fine preterlasas pafi.

La traferta soldato de la novelo „La Fusilo” de KOZIMA Nobuo ne fleksiĝas antaŭ sia vivanta celo, kaptita ĉina knabino, ple-nomas la ekzekutan ordonon kaj per tio ankaŭ la ekzekuton de sia memo, psika kohereco.

Infanoj trasuferas la postfrontan „militon”, perdinte siajn gepatrojn en „La Tombo de Lampiroj” de NOZAKA Akiyuki. Dum siaj treniĝoj kaj drivoj ili konatiĝas kun tuta gamo de mizeraj kaj diversaj tipoj de homoj. Ilia sorto fadenas tra ĉiutagaj bataletoj por la ĉiam ŝrumpantaj ŝancoj de transvivo direkte al la neevitebla fino. Mi ne legis pli konvinkan, ĉar eble pli animoskuan apelacion kontraŭ la milito.

Ziro, protagonisto de la novelo „La Juĝo” de TAKEDA Taizyun mortigas senkulpajn kamparanojn, obsedite de la animotorda psikotrado de la militismo. Liaj sinpravigoj certasence memorigas pri la rezonoj de la konscia murdinto Raskolnikov en la romano de Dostojevskij „Krimo kaj puniĝo” kun la diferenco, ke ĉe Ziro mankas sociaj-raciaj kaŭzoj por la mortigo. Simile al Raskolnikov, li elektas la vojon de la sinpurigo, submetas sin memvole al la puno, sinjuĝo.

La milito ne ĉesas postmilito, ĝi plufuriozas ne nur en la koroj kaj konsciencoj, sed ankaŭ en la socio, interhomaj rilatoj. Ĝi mistordas homojn, taŭzas plurjarcentajn hierarĥiojn de valoroj. Ĵen konsterna, tamen karakteriza postmilita filozofio el la „Korbikuloj” de UMEZAKI Haruo: „Ni estas pasaĝeroj en superplena vagono. Strikte limigita estas la tuta kvanto de feliĉo de la japanoj. Se unu feliĉiĝas, tiom pli malfeliĉiĝos iu alia. Tio similas al la fakto, ke, dank’ al la forfalo de l’ oĉjo (elpuŝita de la pasaĝeroj — noto de JKH), ni postrestantaj, povis ĝui tiom da spaco. Ni preferu deziri malfeliĉon de aliaj, ol feliĉon al si mem. Antaŭ ol serĉi feliĉon kiu ne ekzistas, ni forpuŝu proksimumojn en malfeliĉon. Dum ni estas vivaĵoj, la plej alta devo estas travivi, kaj aliaj ideoj estas sentimentalaĵoj.”

Mankas rajto plendi, ke la kompilintoj elektis ne atentovokajn novelojn. Oni konsiderus tiom da sensacioj eble troigita, banala, se la streĉo ne traretus krom la okazaĵoj ankaŭ la internajn kaj interpersonajn luktojn de la rolantoj.

El la 12 noveloj 4 ne koncernas senpere la militon kaj ties sekvojn. Inter ĉi lastaj ni trovas la novelon de ABE Kobo „La Invaduloj”, kiu donas vivecan, simbolan bildon pri la altrudiĝo de la faŝismo en formo de loĝejokupa familio kaj pri la sendefendeco de la persono en la socio. Li alvokas la atenton pri la graveco de la interhoma solidareco kiel kontraŭrimedo al la atomigaj, dividaj klopodoj de la misuzantoj de la potenco.


Oni ne povas ne pensi pri Esperanto, legante la radiofonan dramon de KINOSITA Zyunzi „La Aŭdipova Kufo”. La kufo de la bonkora Toroku ektaŭgas neatendite, sed ne hazarde por la kompreno de la parolo de bestoj kaj plantoj. Tiel Toroku malkaŝas la sekretojn de la naturo kaj kapabliĝas kuraci plantojn, plibonigi la vivon de la homoj. Kaj parafraze por Esperanto: se la homoj estus pli bonaj, ili povus ekposedi la aŭdipovan kufon Esperanto, kaj kompreni pli funde unu la aliajn kaj plibonigi tiamaniere la mondon.

La noveloj estas zorge elektitaj, ĉiuj produktoj de la moderna japana novelarto. Ili ĵetas lumon al diferencaj facetoj de la samtempa japana vivo, mankas inter ili ŝatoĉasaj senso- kaj sentotiklaĵoj kun magra enhavo. La deku pecojn esperantigas 9 tradukistoj, inter ili tiel atutaj kaj produktmaj, kiel MIYAMOTO Masao kaj KONISI Gaku. La lingvaĵo estas preskaŭ senripoĉa, preseraroj maloftas. Mi nur maljesas pri la anglisma uzo de „ekspekto” en la senco de „atendo” kaj atentigas, ke „ĉesi” kaj „sediment” estas netransiĝaj. Mi opinias superflua la troprecizeman neologismon „neksta” anstataŭ „sekva”. En komplikaj sintagmoj ie kaj tie forgesiĝas la akuzativa finaĵo.

La novelojn akompanas klarigaj notoj librofine kaj konciza trarigardo de la postmilita literaturo. Volonte mi vidus ankaŭ biografiajn notojn pri la aŭtoroj. La libro reprezentas markantan paĝon en la postmilita japana literaturo, kiun mi rekomendas kun bona koro por tiuj, kiuj pretas al pli funda kompreno de la japanoj.

József Kiss Horváth





GAJA PAÇO



Atentu viajn fingrojn!

- Ĉu vi scias, kial mi batis vin? — demandas ŝtelisto de sia fileto.
- Ĉar mi manĝis tiun — ĝemas li — marmeladon...
- Tute ne! Sed ĉar vi lasis sur ĝi vian fingrospuron.

Gardu ĝin bone

- Kion vi portas en tiu medaliono, kara?
- Ho, harojn de mia edzo.
- Sed li ja vivas ankoraŭ!
- Certe, sed hararon li jam malhavas.

Gardu ĝin malbone

- Ĉu estas permesate, karega artistino, demandi vian aĝon — lanĉas la direktoro.
- Ho, sinjoro direktoro, tio estus malfacile respondebla. Vi devas ja scii, ke mia aĝo ŝanĝiĝas en ĉiu minuto...

Malbone ĉar saĝas

- Post la dua, fiaskoplena ekzameno la studento donas fi-dindan klarigon al la patro:
- Tiel devis okazi denove, tion volis la fato! Imagu pa-ĉjo: la samaj ekzamenantoj en la sama ĉambro sidis, eĉ la demandoj estis la samaj!

Certe malsame

- Onklino kara, mi petveturis ĝis la maro, haltiginte ĉi-foje ne pli ol tri aŭtojn — rakontas fiere la ĉarma nevinjo.
- Nu, belega afero! Kiam mi estis tiel juna, neniu knabino pensis pri tia frivolaĵo, haltigi aŭtojn...

Simpla operacio

- La kirurgo trankviligas la pacienton:
- Neniom timu, sinjoro, okazos ege simpla operacio! Jam post duonhoro via kruro moveblos. Post horo vi jam ĉirkaŭkuro la liton — bone? Kaj vespere vi jam povos perpiede hejmeniri.
 - La paciento plende ekkrias:
 - Karega doktoro, sed almenaŭ dum la operacio lasu min iom kuŝi!

Simpla solvo

- Tiu genia aparato plenumos la duonon de via labo-ro! — persvadas la komizo en la komputilvendejo.
- Grandioze! — respondas la aĉetanto (kiu alvenis pro reklamo legita en FOKUSO). — Do, vendu al mi tuj du aparatojn!

Tute simpla bankedo

- Mi volas mendi tre modestan kaj simplan bankedon, tute intiman, por geedziĝo.
- Je via servo, sinjoro! Kaj por kiom da personoj ni aranĝu la tablon?
- Nur por la fianĉo.

Ideala modelo

- La juna pentristo akceptas gaste fraŭlinon, kaj amplene li flustras:
- Karulino, vi estos mia modelo, la unua kiun mi tiel ardege amas...
 - Ho, mi vere feliĉas... sed kiom da modeloj vi havis ĝis nun?
 - Estis kvar. Unu pomo, du piroj kaj unu vinbotelo...

Ideala virino

- Laŭ mi, amiko, la ideala virino aspektas belega, scias multe, kaj senĝene parolas al mi pri siaj spertoj ĉiuves-pere hejme.
- Kara amiko, al mi ŝajnas, ke viaj mensaj okuloj alfik-sas ne virinon, sed televidilon!

Ele-fantazia!

- Helpu doktoro! Mi freneze enamiĝis al ĉarma elefan-tino...
- Sed tio estas ja malnatura! Vi devos forlasi ĝin.
- Mi plene konsentas — sed diru, ĉu eble vi konas iun, kiu bezonas gigantan fianĉinan ringon?

Astrologie

- Diru kara Marinjo, ĉu vi estas Virgo?
- Kion vi pensas? Mi estas Ŝafo...

Kaj plue...

- Kion mi faru, se malgraŭ estante Ŝafo, mia amato traktas min kiel hundon!?
- Tiel malbone?
- Jes. Li postulas, ke mi restu fidela...

Ervin Fenyvesi

EKZAMENO SEN RISKO

Admono al verkistoj

Denove ni citas el Arto Poetika de C. E. R. Bumy en la linioj H. 6. kaj V. 1. (ensendendaj linioj).

Inter la solvantoj ni lotumos premiojn.

Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

Horizontale: 1. Kaptakiraĵo, 13. Poezia branĉo, 14. Komparativa konjunkcio. 15. Maldolĉe, 16. Kopiado de agoj, 17. Ne la sama, 19. Forte eksciti (R), 20. Opo de duoble kvin, 21. Muzo de la astronomio, 23. Leĝo, kolekto de normoj (R), 24. Femalo, 25. Trisilaba versero, 27. Reen: prepozicio, 28. Duono de roto (!), 29. Larĝa strato, 30. Estanta el valormetalo, 32. Konsonantoj de altiro, 33. Senakva (R), 34. Tragedia (R), 36. Rivero en Venezuelo, 39. Persona pronomo, 40. Nigra, paserforma bird', 41. Specio de siringo, 42. Ĉiu parto de la tuto plaĉe akordanta, 43. Reen: japana versform', 44. Nobela junul', servanta feŭdulon, 45. Mezurunuo por likvaĵoj (R), 46. Mezurunuo de elektra rezistanco (R), 48. Laŭta invito, 51. Oleo — angle, 52. Kolorigil', 54. Reen: opera kanto, 55. Supernatura estulo, 57. Refleksiva pronomo, 58. Bleki, lupe (R), 60. Komenco de V. 22. 61. La unua tago de la semajno, 63. Virina nomo, 65. Malsama objekto, 67. Granda diboĉo (R), 69. Ceremonia (ekz. marŝo).


Vertikale: 2. Leda bendo, 3. Vira nomo, 4. Reen: granda stepa bird', 5. Fino de H. 36., 6. Prepozicio sole por numeraloj, 7. Internacia lingvo, elpensita de Schleyer (R), 8. Komenca spaceto de skriba linio por apartigi, 9. Artikolo, 10. Kare ŝati iun, 11. Forigi herbaĉojn (R), 12. Kantbird', 17. Reton teksa besteto, 18. Reen: refleksiva posedpronomo, 21. Kultura organizo de UN, 22. Pseudosufiks' por komplikaj aparatoj, 25. Mezo de kavo! 26. Aŭguro (R), 29. Devenanta el vira linio, 31. Antaŭmorta suferado, 32. Violkolora, 34. Almovi ion al si, 35. H. 19. — pasinte! 37. Silabo el V. 12. 38. Gravega sensilo, 39. Movo por antaŭiĝi en akvo, 42. Koncerna frapon por tranĉi, 44. Pordego (R), 47. Forte malinklini al io (R), 49. Poseda pronomo, 50. Ne vin, 53. Rapidege paŝadi, 55. Paro (R), 56. Impresas flarsenton (R), 59. Radiko de V. 32. 61. Poseda pronomo, 62. Kiel H. 30. 64. Ero de afero! 66. Persona pronomo, 68. Samspecaj de agado!

I. Z.

Solvo de la krucenigmo en la n-ro 1989/3:

La danĝera lingvo — Esperanto en la uragano de persekutoj — Ullrich Lins — L' Omnibuso.

Premion gajnis per lotumado: Atanas Gaev, Asenovgrad, BG; s-ino Róza Halász, Salgótarján, H; E-Klubo de METZ, F.



Ekzamenanto: Márton Fejes

La bona lingvo de Claude Piron

La konata verkisto en tiu ĉi libro (eldonaĵo de „Pro Esperanto” — Vieno kaj HEA) babilas kun ni pri nia ŝatata lingvo.

1. Kiu verko de Tibor Sekelj estas menciita en la libro kiel tipa ekzemplo pri la „reala lingvo”?
2. El kiu poemo citas la aŭtoro plurajn variantojn de la unua strofo por kompari?
3. Kial ĝenas la aŭtoron la vortoj: *teologo, monogamio, homoseksuala*?

Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvoj de la demandoj en la n-ro 1989/3:

1. Challe, Jouhaud, Zeller kaj Salan francaj generaloj direktis OAS.
2. Gerradi estas ŝtatprokuroro.
3. Clever torturis per kurento la patrinon de Simon ĝismorte.

Premion gajnis per lotumado: Vladimir Ĥodin, Ĥarkov, Ukrainio, SU; s-ino Edith Plümecke, Magdeburg, GDR. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.



Korespondi deziras

Kem. inĝenierino Elviira Liht (38) ktm, *Haapsalu*, Vöidu 85-36, Estonio SU-203.170. — Instruisto de hist. Helmut Bein (55) kaj edzino (45), kun familioj pĉt en H, PL, SU, kaj interŝ. feriadon: *Halle-Neustadt*, Block 147-2, DDR-4090. — S-ro Sidorkin Jurij, pri pacifismo (ekde unua kongreso) k.a. similaj societoj. *Nabereŝnie Ĉelni Novij gorod* d. 27/20-167. Tatario, SU-423.827. — Ĝardenistino Aleksandra Paluszek (20) pri fotoarto, turismo, floroj, ĉevaloj kol. pm, bk. *Rychliki*, PL-14-411. — Bibliotekistino Larisa V. Piskunova (30) pri poezio, lingvoj, kun b-tekistoj/grafistoj, ankaŭ A, F, G-lingve. *Armarvir* ul. Kalinina 130, SU-352.900. — S-ro Vadim Ĉajkin, pri orientaj kulturo, filozofio, batalartoj, Wusho, *Ĉjurup* p.k. 24. SU-326.520. — Galina Kijas (35) instr. de latino, pri agnijogo, ŝako, gimnastiko, operoj, muziko, lingvoj, k.a. *Tomsk* E-klub a/k 261, SU-634.041. — Masaĝisto Stanislaw Balawajder, kol. bk. *Bielawa* Os. XXV-Lecia PRL 37/73, PL-58-260. —

Litoviaj komencantinoj (17) ktm, pri literaturo, kol. bk de bestoj. F-ino Inga Endriukaitytė, SU-235.308 *Paneveŝis*, str. K.Klorio 6-14, kaj Daiva Jonušaitė, SU-235.309 *Paneveŝis*, str. Grigo 47-49. — F-ino Anna Blajchert (18) pri muziko, folkloro, turismo, kol.bk. *Legnica*, str. Marŝa 14/28, PL-59-220. — Hungaraj komencantinoj (12-22) ktm, pri sporto, muziko, lingvoj, pk, kun gejunuloj 12-25 jaraj. *E-Grupo Verda Stelo*, *Orosháza* p.f.27, H-5900. — Svetlana Sersko (21) bibliotekistino, ktm, pĉt, *Risti*, Koidu 4, Estonio SU-203.140. — Jaroslaw Frydrysiak (26) biologio-studento, pri vivo, kutimoj, turismo diverslande. *Pniewo*, Plecka Dabrowa, PL-99-312. — Anna Klimas (33) agroteknikistino, pri literaturo, kulturo, turismo, kol. pm, bk, sondiskoj, libroj. *Wagrawiec*, Kopaszyn 21, PL-62-100. — Klaus König (23) go-ludanto, pri literaturo, k.a. *Augsdorf*, Hermannstr. 16. DDR-4251. — Teknikistoj el *Bielawa*, PL-58-260: Zdislaw Ardelli (ul. Labeledzia 3) kaj Dariusz Michalak (ul. Strazacka 5m10) ankaŭ pri muziko, bk. — S-ro Valdis Gulbis (52) sperta s-ano, ktm, pĉt, interŝ. bk, Eldonaĵoj. *Libagi*, „Andumos”. Latvio SU-229.590. — S-ro Oleg Moloŝavcev (22), havas fileton, dez. amikiĝi kun similaj familioj tm. *Moskva* str. Lavoĉkina 56-135. SU-125.502. — F-ino Marina Klimaŝina (27) kun insigno/blazono-kolektantoj. *Leningrado*, Novoizmailovskij pr. 81-55./ SU-196.247. — S-ro Vadim Ĉajkin ktm pri orienta kulturo, batalartoj, naturismo. *Curupinsk1*, p.k. 24, SU-326.520. —

Kuracisto kaj ekonomikistino, pri muziko, medicino, turismo: Barbara k Zbigniew Kolankowscy, *Sucha Kosz* lwiegcino 41, PL-76-003. — S-ro T. James Brennan, (56) kun ges-anoj, ankaŭ A, F, G-lingve, pri lingvoj, *Willowdale*, 23 Kathrose Drive, Ontario M2J 3P4, literaturo, religioj, vegetarismo.

Kanado. — S-ro Marek Bamberski (26) pri popola vivo, artefaritaj lingvoj k.a., prefere kun hungaroj. *Pinczyce* Huta Stara 120, PL-42-340. — S-ro Nikolaj Konovalov, pri speleologio. *Rostov/Don*, ul. Volokolamskaja 3/1-33, SU-344.064. — S-ino Judita Zukan-

skinė (39) kun geamikoj. *Vilnius* ul. Statybininkus 8-45. — Litovio SU. — Janusz Porebny (24) matematiko-studento, int. pri baroka muziko, J.S. Bach, sciencfikciaj verkoj, ŝatŝiu-ĉina kuracado, sporto, ludas gitaron, ktp. *Rzeszów* Al. Niepodległości 9/6. PL-35-303. — Svetlana Kućic (26) flegistino, kun geamikoj pri sporto, medicino. *Brest* str. Vorovskogo 11-1, SU-224.000. — S-ro Ceslovas Trucionis (52) oficisto pĉt. ktm. *Panevėzys*, Domaseviciaus 1-17, Litovio SU-235.300. — F-ino Audrone Zelvyte (19) ktm, pĉt. *Pasvalys* str. Vyšniu 24-19, Litovio SU-235.250. —

HUNGARA VIVO • Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik • Redakta Komitato: Szilárd Bálint, Stefan McGill, Tibor Bessenyei, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro György Nanovfszky, Péter András Rados, Sándor Révész, Zsuzsa Varga-Haszonits. • Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfons Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk • H-1368 Budapest, pk. 193. Telefono: 563-659, 564-093. Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. • Respondeca eldonanto: Oszkár Princz. • Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoŝtupoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (HELR, Budapest XIII. Lehel u. 10/a. H-1900) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) 11,- USD aŭ egalvalora sumo en alia valuto. * Presis la Presejo de HEA. Indekszám: 25 377 0018-7704, ISSN 0018-7704.

LETERKESTO

D-ro Josef Kondor, *Neuwied*, D: „En la n-ro 89/4 de H.V. mi legis tre interesan artikolon „Amara datraveno”, en kiu estas menciita Eŭgeno Ritenberg, boparenco de la familio Zamenhof. Nu, tiun ĉi sinjoron, loĝantan en la sveda urbo Uppsala, mi hazarde renkontis en Brighton dum la Solena Malfermo, resp. dum la Interkona Vespero de la ĉi-jara UK. Laŭ lia peto, mi fotis lin, kaj la foton kompreneble mi jam sendis al li, ricevinte lian nomkarton. Li kore dankis al mi la senditajn fotojn kaj nun, danke al tiu menciita artikolo, mi jam vere scias, kiun mi fotis” — skribis nia malnova abonanto, jam emerita gimnazia profesoro el FRG. Videble, la movadhistoriaj fadenoj foje kaj abrupte interplektiĝas, farante emociigajn impresojn kaj memorindajn konatiĝojn, pri kiuj poste vere indas raportiti. Tiel raportis nia menciita artikolo, kaj tiel donis apartan guston la travivaĵo, kiun vi transdonis al nia legantaro per la supraj frazoj, vere dankinde.

S-ro Zdenek Hrsel, *Brno*, CS: Riĉa enhavo legeblas — laŭ via konstato — en la enkondukaj artikoloj de Vilmos Benczik pri la rapida evoluo en la hungara vivo — por skribi ĉi-foje plenrajte per minusklaj literoj nian revuo-titolon. Se Vi aprecas tiujn artikolojn kiel, serie aperintajn informojn ĉiam pli aktualaj, kaj tial aparte dankindaj, nia redakcio devas senti kontenton, ĉar ankaŭ tiel ni plenumas la internacian rolon de nia lingvo, fidele servante kaj sincere informante nian legantaron.

D-ro Julius Balbin, *Novjorko*, Usono: Via informo pri nova E-revuo eldonota en Budapeŝto estas nur parte ĝusta! En la jaro 1990 en nova formo A/4 aperos BUDAPEŝTA INFORMILO, en ĉiu dua semajno — kaj tio estas vera surpriza novaĵo ĉe malnova gazeto monata. Vian poemkolekton, rikolton de kvaronarcento, ni atendas kun intereso el Italio. Koran saluton!

**Kérjük, keresse fel az Alföldi Tűzép Vállalat
Bács, Békés, Csongrád megyei Tűzép-telepeit, ahol
szakembereink készségesen adnak felvilágosítást.**




Nálunk előnyös és biztonságos az építőanyag beszerzése.





KORAN BONVENON EN DEPARTEMENTO K O M Á R O M

Agrablaj plezuroj atendas la vizitantojn en la pitoreskaj
urboj ESZTERGOM, TATA kaj KOMÁROM.




La kuracakvan termobanejon de Komárom indas ĝui dum la tuta jaro.

Apud la termobanejo situas la dustela nova HOTEL THERMÁL
de KOMTURIST — taŭga gastejo por ripozantoj.



Estu nia gasto en Tata, Komárom, Esztergom.



1990-07- - 2

Informojn volonte donas al Vi:
Centro KOMTURIST
H-2890, TATA, II., Ady E. u. 24.
Telefono: 34/83-211 Telekso: 27-459

komturist
H-2890 TATA II., ADY E. U. 24.
Telefono: 34/83-211 * Telekso: 27-459

